



Kulturaj Kajeroj

E. MAHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj EPINEUX -LE-SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Fracujo)

J A R A B O N O :

Sendotaj al : Micard Henri
« Kulturaj Kajeroj »
Epineux-le-Séguin (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

SEPTEMBRO-OKTOBRO

1965

5

KULTURAJ KAJEROJ

1965

Septembro - Oktobro

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna repesaĵo.

ENHAYO

Pri nia Kulturdomo

Esperanto tra la mondo

Frangéul

El la lando de 51-a U.K.

Ĉe rava Lago Balaton

P. Balkanyi

El prelego

La parola lingvo

G. Roux

Monda problemo

Nutri la homojn

B. Cheverny

Arkitekturo

La homo kiu provis
ekvacigi la feliĉon

Niaj poetoj

A. de Orriols

A. Su

C. I. Coppens

Gravaj datrevenoj

Fantaziaĵoj

A.C. Coutinho

Por via distro

Nia konkurso
Amuzaj problemoj

P. Chevalier

A. Jarlier

Gramatiko per bonhumoro

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.


KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

PRI NIA KULTURDOMO



Pasinta estas plia somero. En la plej granda parto de nia lando la suno estis malofita, la feriantoj pli ofte portis pluvmantelon ol sunombrelon. Kvankam malagrabla vetero ne tute ŝparis nian Kulturdomon, ĝi neniam estis tiom malbela, ke ĝi malhelpis la planitajn aktivadojn, kaj la ekskursoj kontentige okazis. Kaj fakte la nombro de partoprenantoj dum la diversaj periodoj estis rekorda.

Post la Paska Kultura Semajno pri kies sukceso ni jam skribis en antaŭa numero de « Kulturaj Kajeroj », la unua grava periodo estis la Pentekosta. Dum kvin tagoj, grupo de kvindek kvar germanaj gejunuloj vizitis Grésillon gviditaj de Pastro Brinkmann. Nur kelkaj el la partoprenantoj estis esperantistoj sed gravas la fakto, ke la traduklingvo de la franca al la germana estis Esperanto. Certe, post la diversaj travivaĵoj en nia kastelo kaj en la regiono, la nombro de junaj esperantistoj en Lengerich/West. pligrandiĝos, kaj ni certe revidos kelkajn el la germanaj gejunuloj en Grésillon por plua lernado de nia lingvo.

La 4-an de Julio komenciĝis la someraj periodoj. Ĝis la 25-a okazis stud-periodo kun tri kursoj gvidataj de S-ro Ribot, S-ro Guillot kaj F-ino Vazon. Ĉi jare partoprenis sufiĉe granda nombro da gejunuloj kaj la finaj eksamenoj montris, ke ĉiuj bone laboris kvankam ili ankaŭ amuziĝis kaj ekskursis.

La 25-an de Julio alvenis el multaj diversaj landoj la partoprenantoj al la Internaciaj Ferioj. Kelkaj antaŭe vizitis Parizon sub la gvidado de F-ino Aubrun kaj S-ro Guillaume ; mallonga sed interesa kaj sufiĉe kompleta vizitado. La diverslandanoj, kiuj ĉeestis tiun periodon multe ĝuis la diversetajn altnivelajn prelegojn faritajn de Sinoj Roux kaj Cheverry, de S-roj Setâlâ, Duc-Goninaz kaj Bormann. Multaj el la ĉeestantoj partoprenis en la vesperaj aktivadoj. Ĉiuj ŝatis la ekskursojn al la Loire-kasteloj, al Le Mans, al La Flèche kaj al Le Lude. Agrablan etcon ĝuis ĉiuj ankaŭ dank'al la partoprenantoj mem.

La 8-an de Aŭgusto komenciĝis la Someraj Semajnoj, kiuj kunigis ankaŭ ĉi jare multajn familiojn kaj gejunulojn. Plej aktive la pli granda parto ĉeestis la kursojn kaj posttagmeze bin-

dis librojn, plektis korbojn, rigardis filmojn aŭ diskutis pri tiuj filmoj. Ankaŭ dum tiu periodo oni ekskursis kaj la gejunuloj (kaj kelkaj malpli junaj) faris la nun ĉiujaran viziton de la grotoj en la Chandelai-arbaro. La 28-an okazis la ekzamenoj kaj poste la adiaŭa vespero. Pri tiu mi lasas la parolon al Solange Leblanc, unu el la junulinoj, kiu skribis al ni : « Por fini kune kaj fratece tiun trisemajnan restadon, ni prezentis esperantlingvan teatraĵon. Ni ĝojis tiamaniere danki ĉiujn, kiuj tiel afable akceptis kaj « adoptis » nin. Ni ankaŭ estas tre dankemaj al la organizantoj de tiu periodo de laboro, ĝojo kaj ankaŭ ripozo. Ni esperas multfoje viziti Grésillon kaj ĉiufoje kun pligrandiĝanta deziro disvastigi nian lingvon ».

Kaj fine, dum la du unuaj semajnoj de Septembro tre laborema kvankam malpli granda grupo ariĝis ĉirkaŭ S-ro Martin por labori kaj praktiki la lingvon. Ankaŭ agrabla estis tiu periodo laŭ la diroj de la partoprenintoj.

Entute sukcesplena somero, kiu alportis al multaj gesamideanoj la okazon lerni aŭ praktiki la lingvon, viziti belan regionon, trovi novajn amikojn ; kiu alportis al Esperanto sukcesojn kaj al la Kulturdomo kaj ĝiaj respondeculoj multajn ĝojojn kaj kuraĝigojn.

Dankon al ĉiuj kaj ĝis la reveno !

★★

El unu el la multaj leteroj ricevitaĵ :

« Reveninte el Grésillon mi esprimas al vi mian dankemon por la tre agrabla restado, kiun « Kulturaj Kajeroj » donace oferis al mi. Mi certe jam aŭdis pri la Esperantista Kulturdomo kaj legis raportojn de staganĵoj sed mi neniam antaŭvidis tiel interesplenajn tagojn. La belega kadro, la afableco de la deĵorantaj gesamideanoj, la vera familia etoso en kiu ni vivis, mia edzino kaj mi, dum du semajnoj, ĉio ravis nin kaj same kiel la plej multo el la esperantistoj, kiuj jam unu fojon venis en Grésillon, ni tre certe revenos ».

(S-ro Raynaud, premiita en nia konkurso.)

Esperanto tra la Mondo



SOMERAJ RENKONTIĜOJ

Tokio. — Kun proksimume 1.700 partoprenantoj el 45 landoj, la 50-a Universala Kongreso estis granda sukceso kun bonega organizado. Reprezentantoj de la japanaj ministerioj por Edukado kaj por eksterlandaj aferoj parolis kaj la ĝenerala sekretario de la japana nacia Unesco-komisiono salutis. Radio, televido, gazetaro kaj internaciaj presagentejoj raportis.

Okazis altnivela japana vespero, teatraj prezentadoj, oficiala akcepto fare de la urbestro, ekskursoj, somera universitato, belartaj konkursoj kun 40 aŭtoroj el 16 landoj.

La fina rezolucio estis sendita al la Ĝenerala Sekretario de U.N., S-ro U-Thant.

Karlsruhe. — En tiu urbo okazis la 38-a Kongreso de S.A.T., kun pli ol 500 partoprenantoj. Tre detale raportis televido, radio kaj gazetaro. Okazis tri labor-kunsidoj; kaj ekskursoj. La infankongreseto estis plena sukceso (40 geknaboj). Telegramoj estis senditaj al diversaj internaciaj asocioj kaj al la U.E.A.-kongreso en Tokio.

Vieno. — 500 partoprenantoj el 22 landoj partoprenis la « Eŭropan Konferencon ». La nova Respublika Prezidento S-ro Franz Jonas, konata esperantisto, akceptis delegacion.

En Linz oni inaŭguris la 10-an de Julio modernan monumenton honore al Esperanto.

Dimitrovgrad. — En aprilo okazis la 6-a Tutlanda Esperantista Junulara Festivalo de Bulgario kun 1.150 gejunuloj el 34 lokoj kaj gastoj el aliaj landoj. La programo entenis prezentadon de pluraj junularaj ensembloj kaj trupoj.

Grésillon. — Ĉiuj someraj periodoj estis plene sukcesaj kun rekorda nombro da partoprenantoj. Informoj aperos aliparte en la revuo.

VENONTAJ RENKONTIĜOJ

Budapeŝto. — La 51-a Universala Kongreso okazos de la 30-a de Julio ĝis la 6-a de Aŭgusto. La kongreso de TEJO okazos en Pecs de la 23-a ĝis la 30-a de Julio. Antaŭkongreso en Debrecen; post-kongreso en Szeged. Petu informilojn de: Universala Kongreso de Esperanto, Budapest 5, Pf. 193, kaj TEJO-Kongreso, Pecs, Pf. 114.

Swanwick (Anglujo). — La 39-a Kongreso de S.A.T. okazos en tiu urbo dum la lasta semajno de Julio 1966.

Hamburg. — Seminario de Germana Esperanto-Junularo okazos de la 27-a de Decembro ĝis la 2-a de Januaro en la junulgastejo de Hamburg-Horn. Temo: « Li kaj Si, junaj homoj en la moderna mondo ». Informoj: Internacia Seminario p/a E. Weide, Nodalbingerweg 65, Hamburg 2.

NOVAĴOJ...

... **el Novzelando.** — En 1964 Esperanto estis instruita al pli ol 1.200 geknaboj en 22 lernejoj.

— La informo servo pretigis novan filmon. Ĝi estas kolora kaj 16mma. Titolo: « La Nov-Zelandanoj ».

... **el Sarlando.** — Fondiĝis Esperanto-grupo en la Universitato de Saarbrücken.

... **el Japanujo.** — Japana Esperanto-Ligo Studenta arigis gestudentojn el 34 universitatoj kaj kolegioj.

... **el Danlando.** — La ministerio por eksterlandaj aferoj aĉetis 1.500 ekzemplerojn de la speciala numero pri Gronlando de la esperanta revuo « Norda Prismo ». Tiu numero entenis pli ol 20 artikoloj pri la temo.

... **el Hispanio.** — Fondiĝis Esperanto-Sekcio en la Klubo de Amikoj de Unesco en Barcelono. Celo: diskonigo de Esperanto inter la Unesco-anoj, disvastigo de la Unesco konceptoj inter la esperantistoj.

LIBROJ

— La eldonejo de « Heroldo » reeldonis la unuan volumon de la Fabeloj de Andersen, en la traduko de Zamenhof.

— En tre bela eldono aperis la japana verko « La Libro de Teo » de Okakura Kakuzo.

— Sub la titolo: « Islandaj Pravoĉoj » Baldur Ragnarsson tradukis tri rakontojn kaj unu poemon el antikva Islando.

REVUOJ

— La 12-a numero de « Monda Kulturo » aperis kun tre riĉa kaj valora enhavo. Abonu ĉe U.E.A.

— Aperis la 1-a volumo de « Kemio Internacia » eldonita de Urugvaja Esperanto-Asocio. Celo: publikigo de verkaĵoj kaj novaĵoj el la Kemio tereno, tiel teoriajn kiel aplikatajn. Abono ĉe: Casilia de correo 1040, Montevideo, aŭ ĉe U.E.A.

— Studenta Tutmonda Esperantista Ligo eldonis sian bultenon (54-a paĝa). Franca reprezentanto: F. Simonnet, 16, rue Dohis, Vincennes (Seine).

— « Paco » monata organo de Mondpaca Esperantista Movado aperas alterne en diversaj landoj. M.E.M. celas nur la porpacan batalon. Perantoj troviĝas en 30 landoj. En Francio: S-ano Blanc, 45 bis, rue Jeanne-d'Arc, Lyon, 3; p.ĉ.k. Lyon 2044-67. Jara abono: 8 fr. Specimeno kontraŭ 1 fr.

KORESPONDA-SERVO

— La zorgantino de la korespondanta servo de U.E.A. estas F-ino C. Hueter, 12, rue des Jacobins, Clermont-Ferrand, Francio. Sendu: nomon, antaŭnomon, adreson, aĝon, kaj dezirojn.

El la lando de la 51-a Universala Kongreso

Ĉe rava Lago Balaton

Pli kaj pli da alilandanoj vizitas la plej grandan lagon de Mez-Eŭropo, la « hungaran maron », la fean lagon Balaton. Certe multaj kongresanoj en la jaro 1966 vizitis tiun regionon parte ebenan, por ĝui la mirindan lagon, kies koloro ŝanĝiĝas preskaŭ ĉiuhore, el la pala bluo ĝis kolera verdo. Sur longaj bordpartoj la velureca sablo karesas, kaj oni povas iri tiel facile, kvazaŭ oni ŝvebus super ĝi, kelkloke la akvo estas tiel malprofunda, ke oni povas envagadi, eĉ infanoj, kilometron. La akvo karese lulas, somere ĝi estas kelkfoje 25-30° C. grada, kaj ambaŭflanke modernaj kaj bone ekipitaj refreŝigejoj, hoteloj, kampadejoj, moteloj kaj kuracejoj donas okazojn al agrabla ripozo, animfortiga saniĝo, agrabla amuziĝo. Multaj eluzas

la tempon por boat- kaj velŝipveturoj, por montaj ekskursoj.

Cu estas mirinde, ke pri tiu lago naskiĝis feaj rakontoj, poemoj, filmoj kaj noveloj? Malnova legendo diras : « Dio kompatis iam la landon ne havantan maron, kaj ploris pro tio. El la dia plorguto formiĝis la rava hungara « maro », la lago Balaton. »

Elinter verkistoj kaj poetoj ni nomu nur Sandor Kisfaludy, kiu tie verkis multajn belajn poemojn, kaj iniciatis la starigon de la unua hungara teatro en ban-urbeto Balatonfüred, por simboligi la nacian sendependecon dum la aŭstro-germana regado. Samloke la elstara gvidanto de la hungara progreska kaj revolucia movado Lajos Kossuth kutimis

pasigi la someron. Jam en 1835 vizitis tiun ĉi bannejon brita vojaĝanto John Paget, kiu entuziasme priskribis siajn travivaĵojn ĉe la lago. Kaj tie funkcias mondfama korusaniga sanatorio kaj hospitalo. En ties ĝardeno staras statuo de la hinda verkisto Rabindranath Tagore, kiu en 1926 la koron sanigis per la tiea kuracado kaj je ties memoro eĉ plantis arbon. Sed ankaŭ sanaj homoj, precipe



Abundan plezuron trovas la ŝatantoj de velŝipado

tis arbon. Sed ankaŭ sanaj homoj, precipe

gejunuloj trovas sanigon, plezuron kaj amon ĉe la lago. — aŭ ili, ofta okazo, perdas tie sian koron por trovi alian...

Alia fama sanigloko proksima al la lago estas la urbo Héviz, kun la plej granda varmakva lago de Eŭropo. La sanigfonto donas tage 80 milionoj da litroj, kaj tial la 6 hektar-granda lago ĉiutage refreŝiĝas. Eĉ vintre multaj uzas ĝin, ĉar ĝia temperaturo ne malleviĝas sub 29° C. Speciale la ŝlimbanado efikas bonege kontraŭ reŭmatismo kaj aliaj malsanoj, la efikon pliiĝas la riĉa enhavo de radiumo. Ni devas ankoraŭ mencii — inter multaj aliaj — la duoninsulon Tihany kun 700 metrojn malgranda lageto. Tiu romantika monteto havas antikvan abatejon kun biologia instituto havanta akvarion por plej diversaj fiŝoj.



La impona bazalt-monto Badacsony, kun fama vinberujo, la multaj ĉarmaj banlokoj ĉirkaŭ la bordo de la 78 kilometrojn longa lago, kie somere kaj regule okazas Esperanto-tendaroj. La gaja infanaro, la agrablaj vesperoj, kiam ofte eksonas la hungara popolmuziko — jen rava allogo. Multaj vizitas la iaman domon de Kisfaludy por gustumi la « sukcon de la monto »; sed oni devas atenti, ĉar okazas, ke kelkaj kvarpiede alvenas : la fajra vino estis troa ĝuo !

Jen kion rakontis pri siaj rememoroj mia filo : « Balatono ĉiam konsolis min. Eĉ tiam, kiam mi estis soldato kaj mi staris dumvintre sur posteno, kiam mi pensis pri Balatono, mi tuj ne plu sentis tiom la malvarmon. Eĉ la memoro varmigis mian koron, lumigis mian animon ! Kaj se iun turmentas zorgo kaj malĝojo, tiu iru al la bordo de la hungara maro, rigardu la akvon brilantan en sunbrilo, aŭ ĉe la vespera lunlumo — kiam mil kaj mil lampoj lumetas sur la bordo, kiel supre la steloj — kaj ankaŭ en la okuloj de la geamantoj. Ili ekvidas, ke la vivo estas bela !

Kaj la milda balatona venteto forblovas la sulkojn de la frunto... »

Se vi ne kredas, provu ĝin kaj — vi ĉiam revenos kaj resopiros !

Paŭlo Balkanyi.

Romantika pejzaĝo de la lunlumigata Belaton

La pazola lingvo

Rabelais diris : « Rido estas propre homa », sed singardeme li nenion diris pri lingvo, ĉar ĉu ĝi estas nur homa ?

Kio estas lingvo ? Estas ĉio, kio esprimas pensojn aŭ sentojn, esploradon de spiritaj kampoj. Do, ni povas diri, ke ankaŭ bestoj havas lingvon, ĉar ili kapablas esprimi ĝojon aŭ doloron, deziron per krioj aŭ per sinteno. Oni rimarkis, ke la superaj sovaĝaj mamuloj, kiuj ne havas klare prononcitan lingvon tamen uzas si-

de tiu besto oni trovis komencon de volvaĵo de Broca, kiu estas centro de la homa parolkapablo. Tiuj sonoj estas herede fiksitaj kaj karakterizas la rason ; junaj bestoj sole bredataj aŭdigas la karakterizajn rasajn sonojn. Estas kelkaj bestoj, kiuj kapablas prononci homajn vortojn, ekz. papagoj, pigoj,... sed tio ne estas natura lingvo : per tiu lingvo ili ne kapablas interkompreniĝi kun aliaj samspecaj birdoj. Ni ne forgesu, ke birdoj havas lingvon, ke ilia kanto



Birdoj havas lingvon

gnalojn por interkompreniĝi. Tiuj signaloj estas aŭ sonaj, aŭ gestaj, aŭ odoraj.

La sciuro de Kalifornio kapablas aŭdi 5 malsamajn sonojn, por alarmi la kamaradojn sed ĝi pli multe uzas odorajn kaj vostajn s'galojn. La hurlanta simio uzas 15-20 sonojn, inter aliaj la malakutan sonon bone konatan de la loĝantoj de tropikaj regionoj, kiu grave rolas rilate al la konduto de la grupo okaze de danĝero. La simio de Siamo uzas 9 sonojn. La juna ĉimpanzo kapablas aŭdi 32 sonojn. En la cerbo

ne estas la sama laŭ la horoj kaj la okazoj. Sciencistoj kaj muzikistoj tre serioze pristudis tiun temon kaj inter aliaj Messiaen komponis gravan verkon pri la kanto de la birdoj. Pri la homaj lingvoj, ne plu temas pri heredaĵo ; ili estas akiritaj per imitado laŭ tradicio.

La gesta kaj mimika lingvo estas tre evoluinta ĉe superaj mambestoj. Pluraj estas la ebloj de vizaĝa esprimo, kiam ili havas sufiĉe kompletan muskolaron ; grave ankaŭ rolas oreloj kaj vosto. La hirtigo, la elmontrado de kelkaj

haroj, la pozicio de la kornoj estas ankaŭ lingvo tute komprenebla por samspecaj bestoj.

La odora lingvo estas ebla dank'al haŭtaj glandoj, kiuj sekrecias odorojn por ni distingeblajn aŭ ne, sed sencoplenajn por ia bestoj. Urino kaj fekajo estas tre preciza indiko. Ĉiuj konas la mirindan kapablon de la hunda nazo. Haŭtaj glandoj maloftiĝas ĉe la mambestoj laŭ mezure, kiel regresas la cerbaj flarsensaj loboj kaj la odoraj lingvoj estas preskaŭ neeblaj por la superaj simioj kaj la homoj.

Do, por la homoj, la ĉefa lingvo estas sonoj produktitaj per la gorĝo, la lango, k.t.p. Konsekvence, la sonoj estas multnombraj kaj diversaj, same kiel la lingvoj estas multnombraj kaj diversaj. Pri tiu diverseco, estas notinda la fajfa lingvo utiligata en unu malgranda insulo kanaria, Gomera. Pro vulkana grundo, la marŝado estas peniga kaj malfacila; la loĝantoj por interkomuniki uzas fajfan lingvon aŭdeblan 8 km. for, eĉ 14 km., kiam la fajfisto estas lerta. Tiu komunikilo estas tre preciza kaj pli rapida ol videblaj signaloj. Ĝi estas tiom rapida kiom la hispana parolado. Ĝi estas preciza ĉar la fajfa sono estas pura; ĝi ne misformiĝas pro fortenco kaj kiam la fajfisto deziras ion transdoni, fajfante li provas fari per la voĉaj organoj la samajn movojn recesajn por prononci la frazojn; la imitado de parolo estas sufiĉa por esti komprenebla.

Se lingvo estus propre homa la infanoj parolus sen ekstera helpo kaj same parolus uzante la samajn vortojn. Sed oni scias, ke tio ne estas vera. La infanoj lernas paroli aŭdante paroli; surda infano komencas babili; sed ne ricevinte stimulojn de aŭditaj sonoj baldaŭ ĝia babilado malprogresas kaj fariĝas krioj kaj gruntoj. Por la homoj la situacio estas biologie unika: ili ne havas la eblecon kompreni unu la alian trans granda distanco aŭ granda intertempo. Unue oni kredis la lingvon donaco de supernaturaj fortoj al homoj; kaj pro influo de kristianismo, ke la lingvo de la elektita popolo (la hebrea) estis fonto de ĉiuj homaj lingvoj. Multe da klopodoj pli malpli fantaziaj provis tion pruvi. Sed antropologio montris, ke tuj ĉe la komenco de la homaro, klare prononcita lingvo ne estis ebla; la studoj de prahomaj kranioj montris ke la iamaj homoj kapablis nur eligi sonojn, kriojn, ĝemojn, kiuj unue nekonsciaj fariĝis iom post iom konsciaj kaj simbolaĵ, ne apartigante objektojn kaj agojn. Sama sono havis plurajn sencojn. Sed gestoj klarigis, nuancigis, fortigis ilin. Ankorau hodiaŭ gestoj havas gravan rolon okaze de

konversacio. Parenteze oni povas noti la valoron de gesta lingvo por surdmutulaj kaj dancistoj.

Dalmáu diris: « Parolo ne estas natura signo ». Fakte la senco de la vorto estas konvencio inter kelkaj homoj. Por indiki domon, homoj diras ekz.: domus, maison, house, casa. Vidu la tre specialan senco de kelkaj ĉiutagaj vortoj uzataj de studentoj, de stratalaĉo, k.t.p. Same gestlingvo estas konvencia: en Turkio, la kapgesto por « jes », por ni signifas « ne » kaj inverse. Do, lingvo estas simbola sistemo. Origine estis nek unu nek pluraj lingvoj; ĉiu homgrupo faris sian lingvon, kiu disvolviĝis, diversiĝis laŭ la homa evoluado. Prahistoriajn ostrestaĵojn oni trovis en tre nombraj kaj diversaj lokoj de la terglobo. La homoj ne kapablis uzi komunan lingvon, ili nenimaniere rilatis, ne havis similajn vivmanierojn. Kunfandiĝo de la lingvoj okazis laŭ hazardo de renkontoj. La lingvo de la potencaj grupoj sin trudis al la aliaj. Dum jarcentoj, en Eŭropo la grandaj komunaj lingvoj estis la greka, la latina, de la iamaj plej potencaj ŝtatoj.

Kiam ni parolas ni projekcias nian spiritan internan mondon eksteren pere de sonvibradoj. Tiuj sonoj tradukas en alian internan menson sperton iel similan al la sperto projekciita de nia menso. Laŭ Sapir: « La lingvo estas pure homa kaj neinstinkta metodo por komuniki ideojn, emociojn kaj dezirojn per sistemo de intence produktitaj simboloj ». Kiam temas pri parola lingvo la simboloj estas sonoj. Per tiuj sonaj simboloj ni kapablas konigi niajn sentojn (kun vizaĝmimiko, membraj gestoj) aŭ sciigi ion al alia persono, aŭ agigi aliajn. Do, ĝi estas komenco de socia ligilo. Ĉu vi ne parolas pri vetero, pri sano, kiam vi renkontas iun, nur por la plezuro kontaktiĝi kun alia persono?

Por la homoj la parola lingvo ne sufiĉas; preskaŭ ĉiam instinkte, ili aldonas mimikon: miensignojn, sulkigo de la brovoj, gestojn, diversajn sintenadojn. El tiuj gestoj kelkaj estas tutmondaj: frotdo de la montrofingro per la polekso signifas doni monon. Kiam estas distanco inter la homoj, aŭdaj signaloj estas uzataj: fajfado, tam-tamo, morsa sonaro. Aŭ vidaĵ signaloj: semaforoj, blanka flago; ankaŭ la uniformoj de policistoj sur la vojo estas bona averto por la aŭtomobilistoj. Nun la skriba lingvo malaperigis la mezepokajn ŝildojn sur la butikoj, ĉar la skriba lingvo pli kaj pli sintrudas en la ĉiutaga vivo de la homoj.

(Daŭrigota) Germaine ROUX.

MONDA PROBLEMO

NUTRI LA HOMOJN

Neniu povas ignori, ke de jam pluraj jaroj, la problemoj de malsato tra la mondo estas aktualaj, kaj volonte, en grandaj skizoj, oni disdividas la homaron en du partoj : tiu de la satigantoj, tiu de la malsateguloj plej ofte loĝantaj en tropikaj zonoj de nia tero.

Fakte en tropikaj landoj, la topografiaj kaj klimataj kondiĉoj — inter aliaj la maloftaj aŭ tute ne sufiĉaj pluvofaloj, kaj la grund-erozio kiu sekvas — grandskale kontribuas al la subnutrado. Kaj, se oftege la tropik-loĝanto estas konsiderata de la blankuloj el mez-varmaj landoj kiel malkuraĝulo, tio devenas de la kutima nesio de la influo de la nutrado — ĉefe la lakta nutrado dum la junaj jaroj — sur la energio de la homo.

Kiel solvi la problemon? Ne bezonas esti specialisto pri malsato por diveni, ke komence oni devas prizorgi la ĉefan hom-nutriston : la grundon. Sed tute ne kredu, ke sufiĉas transporti tien modernajn agrikulturajn maŝinojn ĉiopovantajn! Kontraue ; blinde kaj intense uzataj sur malriĉaj grundoj ili povas esti pli ruinigaj ol utilaj. Tamen, ĝenerale, la grundo kapablas nutri la homojn, kiuj ĝi portas, kaj eĉ en subevoluintaj landoj ekzistaj nekonjektablaj riĉo-fontoj kiuj, taŭge ekspluatataj permesus rapidan kreskigadon de la produktado.

Kompreneble, por atingi tian celon, kompleta edukado de la indigenoj estas necesa. Pro manko de teknikaj konoj, ankaŭ de la konvena ilaro, la terkultivistoj en subevoluintaj landoj ege malmulte rikoltas. Oni restas konsternita de la praeco de la metodoj, ekzemple en afrika agrikulturo. En multaj regionoj la falĉilo estas ankoraŭ nekonata, nur serpon oni uzas. Tie spontanaj rikoltoj estas neuzitaj aŭ malsparitaj pro manko de konvenaj sirmiloj, kiuj gardus ilin de la bestoj kaj de la vetero. La akvo, tiel alte ŝatata en tropikaj landoj, tamen ofte perdiĝas pro manko de irigacia reto. La grundoj, kiuj ricevas neniu sterkon rapide ruiniĝas precipe, kiam oni praktikas unukulturadon. Same, migranta agrikulturo sur bruligitaj ĝangaloj, ankoraŭ nun tro ofte uzata, okazigas senarbigon treege malutilan por la konservado de la grundo, kaj enkondukas erozion, kiu kaŭzas elĉerpigon de le tero.

Tiel oni konstatas, ke ne sufiĉas akiri novajn kulturterenojn, kaj transformi en kampojn pli malpli riĉajn terenojn, kiuj ĝis tiam neniam ricevis homan prizorgadon, oni ankaŭ devas haltigi la « fabrikadon de dezertoj ».

Plej necese estas eduki la indigenojn pri plej taŭgaj teknikaj, disponigi al ili agrikulturan materialon bone adaptitan por la lokaj kondiĉoj, selektitajn semojn, plibonigitan brutaron kaj instrui ilin pri la maniero regi la akvon. De la akvo-kontrolo dependas la evoluado de la produktado, la ebleco mildigi la rezultojn de la klimat-rigoreco, multobligi la plant-specojn, riĉigi la kvaliton de la nutro-produktaĵoj, plibonigi la familian higienon... kaj samtempe liberigi la virinojn de la pezaj taskoj pri taga akvoprovizado.

Eble vi pensas : « Ho, en tiu sfero, pere de moderna scienco, ĉio estas ebla ! Akvo ne mankas sur nia terglobo, nur sufiĉas alkonduki ĝin laŭbezone. » Sed, ho ve, grandaj kvantoj sur kaj interne de nia terglobo estas salaj kaj akvo-saleco, eĉ minimuma, povas okazigi pli da malbono ol da bono kontraŭ la plantoj. Vi povas argumenti pri la izraelianoj, nederlandanoj kaj aliaj, kiuj helpe de modernaj teknikaj sukcesis sensaligi maran akvon. Jes, ni povas omagi al la nederlandaj pioniroj, kiuj ne nur reprenis terenojn de la maro, sed ankaŭ transformis marpartojn en nesalajn lagojn.

Hodiaŭ multaj popoloj imitas ilin uzante por la distilado ĉu proprajn, do ne tro multekostajn, naturajn rimedojn, ĉu nukleajn reaktorojn, sed oni devas konfesi, ke tiaj gigantaj laboroj postulas monon plej ofte mankantan en subevoluintaj landoj. Denove, mi facile imagas vian reagon. Jes, se la moderna scienco pri atomoforto estas nepre direktata nur al pacema celo, ĉio iĝus ebla !

Sed la demando restas : en la nunaj cirkonstancoj, kion fari por nutri ĉiujn homojn? Tiun temon mi pritraktos en venonta artikolo.

B. CHEVERRY.



ARKITEKTURO

La Homo, kiu provis ekvaciigi la feliĉon

« Le Corbusier mortis ». Tion ĉiuj legis en ĉiuj gazetoj en la mondo antaŭ nelonge. Li dronis en la Mediteraneo, sur la Lazura Marbordo. Li estis 78-jara.

Charles, Edouard Jeanneret, nomata Le Corbusier, naskiĝis en La Chaux de Fonds en Svisujo la 6-an de oktobro 1887, kaj fariĝis Franco en 1930. Arkitekto, pentristo, poeto, teoriisto, li unue estis meminstruito. Dektri jarojn aĝa, li estis horloĝ-gravuristo en Svisujo. Je tiu epoko li ege deziris fariĝi arkitekto, impetoge studis kaj akiris sian unuan mendon kiam li estis 18-jara. Ek de tiu tempo li travojaĝis Eŭropon, vizitante Italion, Vienon, Parizon, Berlinon, Balkanojn, Grekion, laborante kun tre konataj arkitektoj en pluraj grandaj urboj. En 1918, li revenis Parizon kaj tie faris siajn unuajn pentraĵojn. Kun Amédée Ozenfant li skribis libreton, kies titolo estas signifoplena : « Post la kubismo ». Tiu libreto estis la ekirpunkto de ilia doktrino, la purismo. Por defendi tiun doktrinon ili fondis revuon : « La nova spirito ». Per tiu revuo Le Corbusier komencis novan karieron : li fariĝis teoriisto, polemikisto, ideo-iniciatanto. En 1924 li malfermis atelieron en Parizo kun sia kuzo Pierre Jeanneret. Pluraj nun mondfamaj arkitektoj tie ricevis lian « funkciistan » instruon : Jose-Luis Sert, Oscar Nie-

meyer, Alfred Roth, André Wogensky. En 1930 li diskonigis sian doktrinon pri la « Ĝojradia urbo », doktrino kiu, kun la « Atena Ĉarto » (1943) estas la evangelio de la « funkciistaj » konstruistoj. Tiun doktrinon oni povas resumi tiamaniere : « Suno, verdaĵo, spaco estas la tri ĉefaj materialoj por la urboplanisto ». Fakte por la « funkciistoj » la vivoĝojo baziĝas sur suno, verdaĵo, ŝtalo kaj ferbetono. En 1942-1948 Le Corbusier kreis la « Modulor », dimensian unuon kalkulitan laŭ la dimensioj de la homa korpo kaj utiligotan cele al la universala normigo de la arkitektaj formoj.

De 1945 ĝis 1950 realiĝis la revo de Le Corbusier. En Marsejlo kaj poste en Rezé-les-Nantes kaj Berlino, li konstruis « Ĝojradiajn Civitojn », prototipojn de loĝ-unuo.

Le Corbusier estis mondfama pli pro tio, kion li instruis ol pro tio, kion li realiĝis. Oni rigardas lin la simbolo de modernismo pri pentrarto. En Brazilo li influis la arkitektan evoluon pere de siaj skolaroj Costa kaj Niemeyer, kiuj konceptis la novan ĉefurbon Brasilia. Al li sin turnis la Hinda registaro por la konstruo de la administra ĉefurbo Chandigarh ĉe la piedo de la Himalajo.

Same kiel ĉiuj grandaj viziuloj li fariĝis iom partieca. Li provis fari la ekvacion de feliĉo, la perfektan kondiĉigon de la socia homo. Per la « funkciismo » li provis solvi la problemojn de industrialigo samtempe aŭtaŭgardanta la individuan liberecon. Sed, ĉefe en Francio, en la patrio kiun li elektis, Le Corbusier renkontis la plej grandan opozicion. Li parte kulpas pri tio ĉar tiom absoluta estis lia malcedemo, kiom arda lia konvinkiteco. Sed li restas granda homo, kiu sincere deziris la feliĉon por la homoj, eble kontraŭ ilia voĉo, kvankam li ne konsciis, ke per lia sistemo la homo paradokse riskis fariĝi la sklavoj de arkitekturo.

(Kompilita el
diversaj artikoloj).



NIAJ POETOJ

LA CIGANA MONAĤINO

El la fama libro « *Cigana Romancaro* » de la
hispana poeto Federico Garcia Lorca
(1898-1936)

Kalka kaj mirta silento.
Ĉe l'aromaj herboj, malvo.
La fratin' brodas lovkojojn
sur pajkolora teksaĵo
dum la sep prismaj birdetoj
flugas ĉe la griza lampo
kaj la preĝej', malproksime,
flustras senĉesan grumbladon
samkiel mallerta urso
farinta surdorsan falon.
Kiel bele kaj gracie
ŝi brodas! Sur la teksaĵo
ŝi emus meti la florojn
naskitajn nur en imago.
Kiaj sunflor', magnolio,
brilaĵetoj kaj rubandoj!
Kaj sur la altara tuko
kiaj lunoj kaj safranoj!
En l'apuda kuirejo
konfitiĝas kvin oranĝoj,
— Kristaj vundoj fortranĉitaj
el Almeria fruktarbo.
Ĉe l'monaĥinaj okuloj
galopadas du ĉevaloj,
dampita bruet' malgluas
ŝian ĉemizan teksaĵon,
kaj vidinte malproksime
la nubojn kaj la montaron,
fendetiĝas ŝia koro
el mento kaj dolĉa kando.
Ho l'plataj' dekliva kun
dudek sunoj ĉe l'supraĵo!
Ho la starantaj riveroj
naskitaj nur en imago!
Sed ŝi daŭrigas senhalte
sian florplenan brodaĵon,
dum en alta ĵaluzio
la sunlumo ludas ŝakon.

Esperantigis : Alvaro De Orriols

VANE SERĈIS MI

Vane serĉis mi en via rigard'
la perditan junecon naivan
Etingiĝis la pura flam-ard'
Kaj mi trovis nur animon senvivon.
Vane serĉis mi sur via vizaĝo
la iaman pudoron survangan.
Sed ĉion rabis for la jaraĝo.
Kaj mi trovis nur palon sensangan.

Armand Su (Ĉinio)

—o—o—o—o—

KALEVALA

El la nekomforta nordo,
El Finnlando forte fora,
Venis la maljuna majstro
Al la griza Grezijono,
Griza kun ruĝaj brikoj
Ĉarma centro de verduloj
Por prelegi pri pratempoj
Kaj kantaro Kalevala,
Kiun klare li deklamis.
Ni aŭskultis kun atento
Vortojn de senbarba bardo,
Sonojn de ŝamano svelta
En senrima rita ritmo.
Dankas ni kun daŭra kanto
Setälän tre simpatian.

C.J. Coppens (Rotterdam)
Grezijono 26-7-65.

GRAVAJ



DATREVENOJ

Antaŭ 500 jaroj naskiĝis en Roterdamo.

Erasmus VON ROTTERDAM. — La eminenta humanisto okupiĝis pri la publikado de grek- kaj latinlingvaj verkoj. Oni lin konsideras la farinto de la nuntempe parolata greka lingvo. Li multe influis la Reformacion per sia reformanta religia fervoro. Li komence estis favora al la Reformacio sed pli poste deturnis sin de ĝi.



Antaŭ 75 jaroj naskiĝis en Ĝenevo

Franck MARTIN. — Tiu artisto estas, kun Honegger, unu el la plej eminentaj komponistoj en Okcidenta Svisujo. Lia muziko asocias la lastperiodan romantismon kaj la impresionismon kun modernaj elementoj. Al Franck Martin ni dankas orkestr- kaj ĉambromuzikon, oratoriojn kaj multajn dramajn verkojn el kiuj la fama: « Sorĉa trinkaĵo ».



Antaŭ 50 jaroj naskiĝis en Novjorko.

Arthur MILLER. — La usona dramisto ricevis sian unuan sukceson kun la teatraĵo: « Ĉiuj miaj filoj ». Liaj ĉefaj verkoj estas: « Morto de la vojaĝa komizo », « La sorĉistinoj de Salem », kaj « Post la falo ». En tiu lasta verko la aŭtoro rakontas sian kunvivon kun Marilyn Monroe. La realismaj dramoj de Miller montriĝas kritikaj kontraŭ la moderna moralo. Pro la teknika lerteco de la enscenigo oni povas kompari Miller kun Ibsen.

FANTAZIAĴOJ

Kio estas la virinoj ?

Dupati diras, ke la virino ĉeestas en ĉio, kio plaĉas. Pierre Leroux, ke la virino estas la koro de la viro. Terencio, ke la virinoj estas floroj, kiujn la amo briligas en la ĝardenoj de l'universo. Byron, ke la koro de la virino estas porcieto de la ĉielo. Alfonso de Esquiros, ke Dio kreis la virinoj, por ke la viroj kredu en li pro ilia amo. La Chaussé, ke tio, kion la virino deziras, estas skribita en la ĉielo. Legourié, ke la virino estas diaĵo, ĉar ŝi estas adorata. Boussanelle, ke ili estas la idolo de nia koro. Desnoyers, ke ŝi estas la lasta iluzio, kiun oni perdas, la lasta feliĉo, kiun la animo ĝuas, la lasta pasio, kiu finiĝas en la koro. Sankta Foi diras, ke la virtoj de la virino malpermesas la viron dubi

la bonon. Lessing diras, ke la virino estas la ĉefafero de l'universo. Constant, ke sur la lipojn de la virinoj pasas la blovo de Dio. Pascal, ke la virinoj estas anĝeloj, kiujn ĉiuj serĉas. Dubay, ke la suno kaj la virino posedas la imperion de la mondo : unu donas al ni la tagojn, la alia ilin beligas. Silvain Maréchal diras, ke la virinoj estas por la mondo morala tio, kio estas la floroj por la mondo fizika. Rousseau, ke la virinoj estas la plej bela duono de la mondo. Ségur, ke, se la virino ne ekzistus, necesus ŝin elpensi.

Gonzales diras : « Ĉiuj virtoj de la virinoj estas iliaj ; iliaj malvirtoj estas niaj : ni ilin instruis al ili ».

La miozoto

El la larmoj, je gutoj de roso similaj, de knabino korenuanta, naskiĝis la miozoto. Ĝi estis blanka, kiel tiuj larmoj, eĉ pli blanka ol la oranĝaj butonoj de bukedo fianĉina.

Estis bele ĝin vidi floranta en la kampo, enviiganta per sia blankeco la blankajn turtetojn kaj la grizblankajn nubojn. La kampo fieriĝis posedi ornamaĵon tiel perfektan. Dume la knabinoj ĝojaj kaj feliĉaj, kiuj promenadis tra la kampo, malsatis la naivan miozoton, dirante : « Vi estas la floro de korenuo ». Kaj ĝi, la pala miozoto, ellasis el sia malgranda kroneto, kvazaŭ sopiron, frazon kiu enhavas poemon de amo kaj kora maltrankvileco : « Ne forgesu min ! ».

Sed ian tagon, la knabino, kiu ĝin naskis fariĝis feliĉa, kaj ĝin... forgesis ! Forlasita restis la miozoto en la verdaĵo de sia malgranda foliaro, dirante, petegante al la ĉielo : « Ne forgesu min ! » Kaj la knabino korenuanta, kiu naskis el siaj larmoj la miozoton, kiam ŝi promenadis tra la kampo, ŝajnis

ne aŭdi la ĝemadon de la filo de siaj larmoj, kiu murmuris el la frangoj de sia vesto : « Ne forgesu min ! »

Tuj kiam la knabino foriris, la miozoto premiĝis, kuntiriĝis, kiel sentante la akran doloron de la sendankeco. Kaj el la blankaĵo de ĝia malgranda kroneto, turnita al la ĉielo, oni aŭdis, kvazaŭ sopiron, tiun ĉi petegon : « Ne forgesu min ! » En unu el tiuj momentoj, traflugis anĝelo blonda kun grandaj bluj okuloj, kiu trovis la petegon de la miozoto suprenirantan al la ĉielo sur kolono de parfumo. Kaj la ĉiela estaĵo kompatis al la senkulpa floro, kiam li ĝin aŭdis tre mallaŭte murmurantan : « Ne forgesu min ! ».

Li sorbis per unu kiso tiujn vortojn ple-negajn je profunda sento, kaj li faligis larmon, armon faritan el bluo kaj lumo, sur la kroneton de la floro. Kaj de tiam, la modesta miozoto, la amforo de larmoj fariĝis blua, eterne blua.

Tekstoj tradukitaj de A.C. Coutinho (1902)



Por daŭre, komferte legi vian revuon, ne forgesu reaboni por 1966.

(Atentu pri la novaj prezoj. Ni devis ilin altigi ĉar de jam pluraj jaroj ili estis senŝanĝaj, kvankam ŝanĝis la pres-kaj send-kostoj. Niaj legantoj bonvolos nin senkulpigi pro tiu bedaŭrinda sed nepre necesa fakto).

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO 1965-66

Kiel ĉiujare komenciĝas en ĉi-tiu numero nia konkurso, kiu daŭros dum kvar numeroj de Kulturaj Kajeroj. Ni atentigas vin, ke nur la abonintoj rajtas partopreni tiun konkurson. La konkurstantoj bonvolu du kunsendi, almenaŭ unufoje, la banderolon de la revuo kun siaj respondoj.

Ni petas vin sendi viajn respondojn antaŭ la fino de la monato sekvanta tiun de la aperigo de la revuo, do, por la ĉi-subaj problemoj, antaŭ la fino de Novembro.

En ĉiu numero de la revuo, la konkurso konsistas el du problemoj. Nur tiujn du problemojn vi de-

vas respondi, kaj tute ne la amuzajn problemojn, kiuj staras aparte de la konkurso. Sendu viajn respondojn al : S-ro Pierre Chevalier, 19, boulevard Ga-

briel-Lauriol, Nantes, 44 (Fr). Kaj ne forgesu precizigi viajn nomojn (S-ro, S-ino, F-ino) kaj adresoj. La du premioj konsistal el :

1. — Dusemajna restado en la Kulturdomo.

2. — Unusemajna restado en la Kulturdomo.

Tiujn restadojn la gajnintoj povos ĝui aŭ en 1966, aŭ en 1967. La gajnintoj de la du antaŭaj konkursoj ne rajtas partopreni (fakte ili povas partopreni sed ne gajni denove).

Unua problemo (20 poentoj) — Enigma

Vi devas trovi frazon konsistantan el 70 literoj. Tiu frazo donas regulon tre gravan por novaj esperantistoj. Tiujn 70 literojn vi retrovos anstataŭigante la subajn seriojn de nombroj per vortoj, kies difinoj estas donitaj. Ĉiu vorto konsistas el tiom da literoj, kiom da nombroj.

21-48-53-13-58-70 : nomo de mondparto

41-6-19-33-65-39-36-59 : dolĉa manĝaĵo

16-27-24-35-36-10 : la kelnero iras tiel

2-63-15-17-49-28-12-6 : longnaza besto

34-25-40-14-37-50-33 : parto de la tago

18-1-52-22-26-8-60-32-6 : la plej facila lingvo

69-57-67-70 : forta trinkaĵo

11-66-7-47-62-20-42 : ne paroli

9-61-55-43-28-36-59 : parto de la horo

38-51-3-64-23 : ne mortis

56-45-68-33 : parto de la monato

46-54-31-29-70 : sinjoro kun granda apetito.

58-5-30-62 : nombro

44-4-43 : montra vorto

Dua problemo (20 poentoj)

En la ĉi subaj frazoj, bonvolu anstataŭigi la punktojn per la taŭgaj vortoj.

1. — Mi ne scias, ... tio estas vera.

2. — La granda ĉiuj monumentoj estas Eifel turo.

3. — Venu eble rapide.

4. — Neniu skribas ruĝa inko.

5. — Se oscedas en ĉambro, ... same oscedas.

6. — kvardek du faras ducent naŭdek kvar.

7. — Nek vi mi povus ripari tiun malnovan muron.

Atentu : Estos kalkulitaj 2 poentoj por ĉiu taŭga vorto, sed estos forprenita 1 poento por ĉiu malĝusta vorto.

AMUZAJ PROBLEMOJ (apartaj de la konkurso)

Solvoj de la lastaj problemoj

La komuna puto : Estu ABC la triangulo, D la centro de la puto sur AC, E mezo de BC, AN paralelo de DE. Montru, ke DN estas la partiga linio.

La surfaco de AEC egalas la duonon de la surfaco de ABC : $S(AEC) = 1/2 S(ABC)$, (la bazo $EC = 1/2 BC$; ortanto estas sama). La du trianguloj AED kaj NED estas ekivalentaj (sama bazo DE kaj egalaj ortantoj : AN//DE).

$$S(AED) = S(NED)$$

$$\text{do : } S(AED + DEC) = S(NED + EDC)$$

$$S(AEC) = S(NDC) = 1/2 S(ABC)$$

$$S(NDC) = S(ABND)$$

ND estas la partiga linio kaj D estas la komuna puto.

Kompletigu :

153	857
46	935
918	4285
612	2571
7038	7713
	801295

Sur la herbejo. — La bovido kiu saltetas maldekstre de la bovino, kiu staras meze de la bildo apartenas al la bovino, kiu sin paŝtas sube kaj maldekstre.

La bovido, kiu saltetas dekstre de la bovino, kiu staras meze de la bildo apartenas al la bovino, kiu montras sian flankon sube kaj maldekstre.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

« Vian opinion, ke la vorton « ĉu » ni devas, kiom eble, uzadi nur en senco demanda, mi trovas tute prava. Ni povas ĝin uzi ankaŭ en la senco de necerteco, aŭ de dubo, aŭ en aliaj similaj sencoj, kiam ni ne havas pli bonan vorton, sed mi neniam konsilus uzi ĝin tute senbezone anstataŭ « jen », « aŭ » k.t.p. Prave vi diras, ke la frazoj « ŝi kutimas havi ĉe sia zono ĉu rozon, ĉu diamanton » kaj « diru tion ĉu al la kapitano, ĉu al la leŭtenanto » estas ne tre bonaj; en la unua kazo mi preferus « jen », en la dua « aŭ ».


(L. L. Zamenhof. Lingvaj Respondoj).



1) Ĉu pro frenezeco, ĉu pro troa saĝo, li estas senkontraŭdireble stranga!




2) Kara patro vi devas elekti : aŭ la naĝejon en la ĝardeno, aŭ la makulojn sur la planko !



3) Mi ĉiufoje renkontas la saman malfacilaĵon, jen pro difektiĝo de la pneŭmatiko, jen pro via dikiĝo !

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (39 aŭst. ŝil.).
Belujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (70 fr.).
Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (10 ŝil.).
Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczi, Bana Cigel, PRIEDVIDZA (1,50 us. dol.).
Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (10 kr.).
Finnlando : S-ino Kerttu Väättänen, Mäntyläntie 4, LAPPEENRANTA 5 (6,2 mk.).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr. 33, - pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (5,6 mk.).
Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^o, la, BARCELONO (77 pes.).
Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (840 lir.).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtako 239 (1260 d.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (5 guld.).
Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg. 56, LAMBERTSEDER (10 kr.).
Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (50 zl.).
Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk. 157007 (8,4 kr.).
Svislando : S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (7 sv. fr.).
Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (1,50 us. dol.).
Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (1,50 dol.).
Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventualaŭ iam ajn karavanojn frue anoncitantajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plilerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo